

Kajeroj **el la Sudo**



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



N-ro 29. Jan. Febr. Marto 1996

Kajeroj — — el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martin Bustín Benito**

Apartado de Correos 4143

E-03080 Alicante (Hispanio)

Sekretario: **Jesus de las Heras Giménez**

Av. Juan Carlos I, 24, 2-G. Ed.Nva. Ronda

E-30008 Murcia (Hispanio)

Kasisto: **José M^a Bernaben Franco**

Graf. Primo de Rivera, 8

E-03369 Callosa de Segura (Alicante)

Mensendoj de kotizoj kaj abonoj al la n-ro 28.09.722.429

en Libreta de Caja Postal. Of. 0412. Sen aldona sendokosto.

Redaktoroj de la revuo:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9^o. C.

E-50002 Zaragoza (Hispanio)

Miguel Fernández Martín

C/ Santa Genoveva, 58. 6^o. C.

E-28017 Madrid (Hispanio)

Kovrilo: Unu el la geniaj Kapricoj el Goya, kiel omaĝo en la 250-a naskiĝodatreveno de la granda pentristo Francisco de Goya.

Enhavo:

La momento de nia adiaŭo

Scienco kaj Junularo

Niaj Financoj

Misa esperantigo de katalunaj toponimoj

Bonvolu ridi...sed ne tro!

Poezia angulo: Francisco Villaespesa

La kosto morti en usona hospitalo

La Movado en kaj ekster Iberio

Nota: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

La momento de la adiaŭo

Kaj alvenis finfine la momento de la adiaŭo. Momento ja malfacile vortumebla, kvankam atendata ekde kiam ni, la ĝisnuna redakta duopo de *Kajeroj*, anoncis nian intencon transdoni nian taskon alimanan. Momento de



viva emocio. Kiom da neforgeseblaj vi-broj! Naski enton, doni al ĝi formon, disvolvi ĝin al tuto kun propra karaktero... Nu, tiajn etapojn ni trapasis ne sen peno, tamen kun granda fervoro: endis kaj indis krei ĉi-latitudo liberan esprimkanalon por la voĉo de la maldekstra esperantistaro. Almenaŭ tian celon -humile ni asertas- ni plenumis. Ja 29 numeroj de nia gazeto, seninterrompe kaj sufiĉe akurate aperigitaj laŭlonge de naŭ jaroj, atestas pri nia pozicio: kondamno de ajna atenco kontraŭ la homaj rajtoj kaj la medio, de ajna fanatikismo, defendo de la socia justico, de laboristaj depostuloj, de progresemaj idealoj... Kaj emfazo pri la kulturo kiel popola emancipelemento daŭre uzurpita de la reganta klaso. Jen la konteksto de niaj literaturaj sekcioj: eseoj kaj poemoj, multaj el kiuj, premierinte sur la paĝoj de *Kajeroj*, konsistigis/os libroformajn studaĵojn kaj poemarojn.

Ni kaptas ĉi ŝancon por elkore danki la nemalmultajn amikojn de nia bulteno, ĉiajn kunlaborantojn, ĉiujn kamaradojn, kies sinceraj esprimoj de entuziasmo kaj, foje, de konstrua kritiko spronis nin al ĉiam pli arda kaj flegita laborado. Apartan dankon al la redaktoroj de *SAT-Amikaro* kaj *Sennaciulo*, kiuj publikis *Kajero*-artikolojn kaj rekomendis nian gazeton al sia legantaro. Fine, niajn plej bonajn dezirojn al nia nova redaktoro, k-do Jesús de las Heras, kiu ekoficos venontnumere. Ni transdonas al li ian materie modestan sed emocie riĉan kapitalon, kun la konvinko, ke post naŭ jaroj ĝi bezonas novan limfon, novajn blovojn, novan perspektivon. Ĉiuflankan sukceson en la dua epoko de *Kajeroj*!

La Redakcio

SCIENCO KAJ JUNULARO

De antaŭ longe, unu el miaj plej fervoraj inklinoj estas mia ofta ĉeesto en prisciencaj prelegoj kaj muzikkoncertoj, kiujn mi katalogis ĉiam kiel verajn amuzojn por mi, kaj tial mi tre zorge elektis ilin dum la vintra sezono, kiam ili kutime okazas ĉe ni. Malfeliĉe tiun duonkaŝan plezuron mi devas rezigni, ĉar pli ofte ol mi deziras, mi devas apriorie plenumi neprokrasteblajn taskojn en la kadro de la esperantista movado, idealo kaj amuzo samtempe por mi. Malgraŭ tio, mi profitas la plej etan eblecon por ĉeesti en kelkaj el ili, kaj laste tio okazis, kiam en la ĉefurbo de Aragono oni anoncis prelegon en la kadro de interesa Programo «Viva Scienco» speciale organizita por junaj studentoj, karakterizo, kiu akcentis mian intereson vidi propraokule pri kio temas. La Programo, kiu celas stimuli la studentaron pri la scio de la grandaj sciencaj atingoj de la 20a jc., ne nur disvolviĝas en Zaragozo, sed eliras el aŭloj por viziti, ekz. la Instituton pri Tekniko Aerospaca de Madrido, la Planetarion de Pamplono, la Astrofizikan Instituton de Kanarioj kaj eksterniaj landlimoj la Institutojn Curie kaj Pasteur de Parizo k.a.

Je la fino de oktobro oni inaŭguris la kurson per prelego de unu el la plej elstaraj intelektuloj en la mondo, d-ro Joan Oró, katedra profesoro de la Universitato de Houston, kiu prezentis siajn renovigajn ideojn pri la Origino de la Vivo en la Instituto "Miguel Catalán":

La tri plej grandaj temoj, kiujn li devis respondi, celis ekspliki la originon de la Homo, kio devigis lin antaŭ sin mem respondi al tri sukenhavaj demandoj rilate al la originoj, de la Universo, de la Vivo kaj, fine, iri ĝis la naskiĝo de la Homo.

«La historio de la *homo sapiens* -li asertis- atingas 15.000 milionojn da jaroj kaj, lokita en la Suna Sistemo, pasis tra la formiĝo de ĥemiaj elementoj, kaj posta biologia evoluo». Prof. Oró atentigis pri certaj esploroj faritaj en la spaco, determinaj en la konstruo de adekvata kadro por ekŝpruco kaj disvolviĝo de la vivo. En la ekspliko pri la formiĝoproceso de la Tero nepre oni devas elstarigi la nekontesteblan rolon de la kometoj en la naskiĝo de la oceanoj kaj en la primitivaj vivoformoj -unu el la teoriaj alportoj de tiu ĉi profesoro-.

D-ro Oró kalkulis la vivokomenciĝon en la Tero de antaŭ 4.000 milionoj da jaroj, kiam la cianobakterioj ricevis la sunlumon kaj transformiĝis en organan materion. «Du mil milionojn da jaroj poste, okazas la unuiĝoproceso per simbiozo de la diversaj specoj de ĉeloj el kio rezultis fungoj, plantoj kaj

primitivaj bestoj. Kosma akcidento okazinta pro asteroido impaktanta (*) ĉe la duoninsulo Jukatano, levis tiom grandan polvaron, ke ĝi eklipsis la sunon dum monatoj, favorante la estingiĝon de plantoj kaj bestoj, inter kiuj estis la dinosaŭroj. Nur malgrandaj ronguloj supervivis tiun katastrofon kaj tiuj evoluis ĝis ili atingis la simioformon, kiu proksimume ses milionojn da jaroj poste fariĝis dupieda estaĵo»...



Kompreneble, ke la prelego de tiu internacie renoma kaj klerega profesoro estis pli ampleksa kaj profunda ol mi resumas, sed mi ne estas fakulo pri la temo kaj, cetere, mi ne volas enuigi niajn legantojn per detaloj, ĉiam interesaj sed envolvitaj per teknikaj eksplikoj ofte ne allogaj. Tial ni lasas tiun sciancan paroladon de prof. Oró kaj tuj aliras tiun alian parton, pri kiu mi ankaŭ interesiĝas: la junularo.

Efektive, junaj studentoj, eĉ multaj el ili ankoraŭ ne universitatanoj, plenigis la salonon kaj streĉe aŭskultis la eksplikojn de la profesoro. Ili partoprenas en tiu kurso volonte kaj tute ne restas pasivaj antaŭ la eksplikoj de la preleganto, do

mia surprizo kaj admiro ne konis limon, kiam tiuj junuloj, dum la posta kolokvo, demandis kun eksterordinara lerteco pri tiuj punktoj, eble ne tute bone komprenitaj, sed ĉiukaze montrante ne nur ke ili tre bone konas la temon, sed eĉ en multaj kazoj formulis demandojn tiel malfacilajn, ke plaĉa rideto ŝprucis el la lipoj de la klerega profesoro kiel esprimo de kontento pro la profunda intereso de la ĉeestantaro kaj sekva rezulto de la priscienca prelego...

Konstati la entuziasmon de tiom da junuloj en tiu scienca medio, aŭskulti ilin rezonadi dum la kolokvo pri temo tiel grava kiel estas la origino de la homo, percepti la optimisman estonton de tiu juna gento kaj la favoran influon kiun ili povas disvastigi inter siaj kompanoj kaj amikoj, ĝuste nun, kiam la kulturaj kaj sciencaj valoroj inter la junuloj estas tiel minusŝatata, kaj la inklino de la juna gento por droĝoj kaj aliaj bedaŭrindaj vivoformoj nebuligas la futuroperspektivon de la homaro, kreu min amikoj, tio estis unu el miaj impresoj plej agrablaj dum lastaj semajnoj.

La partopreno de la junularo en la grandaj taskoj por evoluigi la homaron estas pli ol necesa: en la mondo de la sociaj ideoj oni bezonas urĝan renovigon, ja ni estas ankritaj en ideologiaj principoj elpensitaj dum la 19a jc., kaj evidente, ni nepre devas perfektigi aŭ superi tiun idearon. El tiuj junuloj, kiuj studas, rezonas kaj debatas, devas veni la solvo de la plej gravaj nuntempaj problemoj.

Ekzistas alia aspekto en la nuna socia problemaro, kiu plenigas per ombroj nian nuntempon: terura ondo de violento skuas nian socion kaj minacas stariĝi la ĝeneralan konvinkon, ke neniu progreso en la mondo estas ebla sen perforto, do, la homaj rajtoj de la individuoj kaj aliaj porpacaj iniciatoj estas nur belaj teorioj tute neaplikeblaj, revoj de utopiuloj...

Oni devas kontraŭbatali tiun teorion, kiu ekmodigis nacionalismojn kadukajn kaj maskitajn revoluciulojn sen idealoj. Inter tiuj, oni informis en niaj laboristaj medioj, ekzistas junaj nazioj, kiuj batas, bruligas kaj murdas svingante niajn proprajn devizojn. Malfeliĉe temas pri junuloj, ne kiel tiuj, kiujn mi admiris dum la priscienca prelego, sed junaj homoj, kaj en ili, en la junularo, kuŝas nia futuro.

Scienco kaj Junularo, scio kaj estontopromeso en nia morgaŭo: kial tiu simpla prelego tiel optimisme impresis min? La scienco estas la bazo de nia progreso. El la Junularo mi esperas la plejan bonon!

A. Marco Botella

(*) Impakto: (el la lat. impactus) renkontiĝo kaj forta kolizio de du moviĝantaj objektoj. Frapego de unu objekto kontraŭ alia. En tiu ĉi kazo, pro kosma akcidento, asteroido koliziis kontraŭ la Tero.

Memoru la novajn kotizojn kaj abonojn:

HALE-membroj (nur SAT-anoj)	800.-Ptoj
Abonantoj al la revuo	1.000.-Ptoj
Abonantoj el eksterlando (dif. poŝto)	1.300.-Ptoj

aŭ ekvivalento en alia valuto.

BILANCO DE HALE EN 1995

Laŭ indikite en nia statuto ni publikigas la Bilancon de 1995 por studo kaj eventuala aprobo en la ĉiujara asembleo de nia Asocio.

Konto-Etato

Saldo favora HALE la 31an de Decembro 1994 83.476,-

Enspezoj

Enspezoj ĉe k-do Gil.....9.500,-
 " " " "1.300,-
 " " "Bustfn ...32.920,-
 " abonantoj Kajeroj... 5.450,-
 " " Kaj.28 ...10.200,-

Sumas la Enspezoj 59.370,- 59.370,-

Entuite sumas 142.846,-

Elspezoj

Presado kaj send. Kaj. 10.215,-
 " " "Kaj-26... 11.391,-
 " " " " 27... 11.391,-
 " " " " 28... 11.391,-
 Send.cirkŝleroj prez. 3.592,-
 Poŝta ĝiro!..... 214,-

Sumas la Elspezoj 48.131,- 48.131

SALDO AL NOVA KONTO 94.715,-

Post la elekto de José M^a Bernabeu Franco, C/ Gral. Primo de Rivera, 8.-03369-CALLOSA DE SEGURA (Alicante) kiel nova Kasisto de HALE, estas dezirinde, ke niaj membroj kaj abonantoj pagu rekte al lia numero 28.09.722.429 ĉe Caja Postal, Of. 0412, sen aldona sendokosto sed menciante la nomon de la sendinto.

Misa Esperantigo de Katalunaj toponimoj kun la duonkonsanta ŭ

Laŭregula esperantigo de toponimoj

Ĝis nun ne okazis seriozaj provoj de esperantologoj kaj geografoj evoluigi raciajn kaj konsekvencajn principojn por esperantigo (aŭ asimilado) de loknomoj apartenantaj al ĉiuj gravaj lingvoteritorioj en la mondo. La jam publikigitaj studaĵoj estas nombreblaj per la fingroj de la du manoj.

1. hispanaj: Bernard GOLDEN. «Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj». Pĝ. 235-257 en **Serta Gratvatoria in honorem Juan Régulo**. Vol. II: Esperantismo. La Laguna. Universidad de La Laguna; 1987. 790 pĝ.
2. ĉeĥoslovakaj: Josef KAVKA. "Esperantigo de ĉeĥoslovakaj loknomoj", en **Scienca Revuo**, 1978, vol. 29, n-ro 3 (131), pĝ. 119-127.
3. japanaj: Naokazu KAWASAKI. "Esperantigaj principoj de japanaj vortoj, en **Esperantologio**, 1950, vol. 1, n-ro 2, pĝ. 88-97.
4. nederlandaj: Wouter PILGER. "Problemoj de Esperantigo de nederland (lingv)aj loknomoj". Pĝ. 557-570 en **Serta Gratvatoria in honorem Juan Régulo**. Vol. II: Esperantismo. La Laguna. Universidad de La Laguna, 1987. 790 Pĝ.
5. brazilaj: Délio Pereira de SOUZA. "Brazilaj geografiaj nomoj" **Serio Brazilaj Kajeroj**, n-ro 1. Brasilia: Laborgrupo "Antaŭen"; 1981. 72 pg. pĝ.
6. tutmondaj: Rikardo ŜULCO kaj Hermano BERMANO (Richard Schultz kaj Hermann Behrmann) **Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj**. Paderborno: Esperanto-Centro; 1989. 141 pĝ.
7. helenaj: Ebbe VILBORG. "Esperantigo de grekaj nomoj", en **Esperantologio**, 1961. vol. 2, n-ro 2, pĝ. 152-158.

Ĝus publikigita estas jena traktaĵo pri la esperantigo de katalunaj toponimoj.

8. Hektor ALOS I FONT. "Proponoj por la esperantigo de katalunlingvaj loknomoj". Barcelono: la aŭtoro; 1995.33 pĝ.

Enhavo de la verko de Alos i Font

En la nuna artikolo mi ne intencas fari kutiman recenzon de la studaĵo sed nur volas atentigi esperantistojn pri ĝia enhavo kaj tuŝi unu el la konkludoj de la aŭtoro.

En tre sistema maniero li trakribis publikigitajn fontojn, en kiuj aperas jam esperantigitaj katalunlingvaj loknomoj kaj informas pri la ĉefaj problemoj rilate elekton de formo kaj prononco. Ekzemple, specifeco de la kataluna kazo estas manko de unueca norma prononco; nuntempe samrangaj estas kvin prononcmanieroj. Sekve, li proponas du eblojn por asimilado:

1. esperantigo laŭ la loka prononco de la loknomo.
2. esperantigo laŭ iuj komunaj reguloj, difinitaj por la tuta areo de la katalunlingva teritorio.

Post mencio de la kvin principoj gvidantaj asimiladon de etnolingva leksika materialo en Esperanto (grafismo, fonetismo, etimologio, tradicio kaj internacieco), li detale priskribas, kiel li proponas asimili katalunajn toponimojn en Esperanto. Per komparo de ĉiuj grafemoj kaj fonemoj en ambaŭ lingvoj, li indikas siajn rekomendojn kaj ilustras la regulojn per listo de la ĉefregionoj, regionoj kaj ties ĉefurboj en la Kataluna Landaro.

La problemo de diftongoj kun la vokalo u

Mi trovas kritikenda la proponon de Alos i Font en sekcioj 2.1.2.1. kaj 2.1.2.2. asimili la katalunan u en diftongoj per "v" en Esperanto. La sekvaj ekzemploj montras kripligon de la katalunlingvaj toponimoj per altrudo de la fremda kaj orelagaca sono "v".

- a. u antaŭ vokalo: Igualada - Igvulado; Guardamaro de Seguro - Gvardamaro de Seguro.
- b. u post vokalo: Ciutadella - Civtadelo; Vall-de roures - Val-de-Rovreso.
- c. diftongoj fine de vorto aŭ nomo: Cap de la Nau - Kabo Navo; La Seu d' Urgell - Sevo de Urĝelo; Sant Feliu - Sant-Felivo;

Port Bou - Port Bovo; Salou - Salovo.

La aŭtoro pravigas sian asimiladon «laŭ la tradicio de esperanto», kiu liaopinie «fiksas la fonetikan sistemon de la lingvo». Efektive, tiu tradicia esperantigo «paŭsas la manieron, laŭ kiu estis kreita la esperanta vortaro, kiu mem sekvas la rusan prononcon de latino: kvar (lat. quattuor), kvin (lat. quinque), akvo (lat. aqua), kvankam (lat. quanquam) ktp.(pĝ. 12).

Por montri, ke la solvo proponita de Alos i Font ne havas universalan aplikeblecon, mi prezentas la sekvajn brazilajn toponimojn esperantigitajn de Délio Pereira de Souza. Li ne altrudas la "v"-sonon en portugallingvaj loknomoj finiĝantaj per diftongoj, en kiuj u sekvas vokalon:

Blumenau - Blumenauo (ne Blumenavo)

Grajaú - Graĵaŭo (ne Graĵavo)

Pajeú - Paĵeŭo (ne Paĵevo)

Poxoréu - Poŝoreo (ne Poŝorevo)

Banabuiu - Banahuio (ne Banabuivo)

Falsa rezonado de A. Albault pri ŭ sekvata de vokalo

Unu el la plej rezolutaj probatalantoj de la uzo de la grafemoj "kv" kaj "gv" en Esperanto estas d-ro André Albault, la prezidanto de la Akademio de Esperanto. Li provas pravigi sian starpunkton surbaze de tute persona interpreto de la **Fundamento**, argumentante, ke vokalo ne rajtas sekvi la sonon de la duonvokalo "ŭ". Mi zorge ekzamenis la enhavon de la kvinlingva **Fundamenta Gramatiko** kaj malkovris, ke Albault misinterpretas kaj malpravas. En **Fundamento de Esperanto** nur la rusa kaj germana tekstoj informas, ke la litero "ŭ" estas uzata post vokalo (j). Krome, "ŭ" estas difinita kiel mallonga "u" en la franca, germana, rusa kaj pola tekstoj sed ne en la angla, kiu diras, ke "ŭ" estas uzata en diftongoj kiel en mount. Rimarku, ke la vorto "diftongo" malestas en la alilingvaj versioj.

La tikla demando estas, kiel decidi pri la Fundamenteco de la karakterizo de "ŭ", kiun faris Albault, se ne ekzistas unuanima akordo inter la kvin tekstoj? 40%-a Fundamenteco estas sensencaĵo; io estas aŭ laŭfundamenta aŭ kontraŭfundamenta. Ĉu ni insistu, ke la germana kaj rusa tekstoj de la **Fundamenta Gramatiko** estas pli aŭtentaj ol la aliaj? Efektive, ĝuste pro la mankhavenco de la regulo pri "ŭ" en ĉiuj kvin etnolingvaj versioj, oni rajtas

dubi pri ĝia Fundamenteco kaj, sekve de tio, ne estas iu ajn kialo aŭ devigo akcepti la aserton de Albault, ke la Fundamento *preskribas*, ke la litero "ŭ" estas uzata nur post vokalo.

La "v"-sono estas kategorie rifuzenda

La uzo de "v" estas nek fonetisme nek grafisme pravigebla en nuntempaj iberiaj lingvoj, kies nomoj kaj vortoj havas diftongojn kun u. Tiu fremda sono estis altrudita pro la aparta parolmaniero de ruse- kaj germaneparolantaj esperantistoj dum la fruaj jaroj de la evoluo de Esperanto. La uzo de "ŭ" antaŭ vokalo por la diftongoj ua kaj ue estas rekomendinda, ĉar tiu rimedo samtempe redonas la ĝustan prononcon kaj konservas la skribbildon de la etimo. Ĝi estas pli bona solvo, laŭ fonetisma vidpunkto, ol la dusilabaj "ua" kaj "ue". Aliaj esperantistoj, kiuj same pensas, estas la meksikano Alberto Gómez Cruz, la kataluno Salvador Gumá kaj la brazilano Leopold Knoedt. Ili jam uzis en publikigitaj tekstoj nomformojn kiel **Venezŭelo** kaj **Paragŭaĵo**. En artikolo en **Boletín** (n-ro 266, 1984, pĝ. 11-13) mi asimilis la rivernomon Guadiana per la formo Gŭadiano, kaj en n-ro 310 de la sama revuo (1993, pĝ. 15) troviĝas la loknomo Gŭadalesto. Ŝajnas, ke tiu asimilada tendenco iom post iom enradikiĝos.

Emocia reago de obsedata slavlingvulo

En sia recenzo pri **La Luzidoj**, tradukita el la portugala fare de Leopoldo H. Knoedt, la ĉeĥa esperantisto Karolo Piĉ surpaperigis la sekvajn vortojn.

«Kaj Gŭadalkiviro, Kŭinto Fabio kaj Kŭirino estas, ĉu portugaleskaj? monstroj! La lingvo konas ja nur Gvadalkiviro, Kvinto, Kvirino. Krome Kŭinto, Kuirino, en Esperanto, ne legiĝas Kvinto, Kvirino, ma Kujnto, Kujrino!!! Kaj ĉu, anstataŭ kvin, ni de nun skribu kŭin?»

Ni havu kompaton por povra, pita Piĉ, kiu ne kapablas artikulacii la sonojn "gŭa" kaj "kŭi", do lia slava buŝo eligas nur la kakofoniajn blekojn "gva" kaj "kvi".

Parolantoj de la lingvoj de Iberio ne devas lerni de fuŝe prononcantaj alilingvuloj kiel esperantigi nomojn el sia denaska lingvo. Oni ne disstreĉu Esperanton sur la kruco de slava fonetiko!

Bernard GOLDEN

BONVOLU RIDI...SED NE TRO!



Trafa respondo

La hejmo-mastrino plendas: -Aŭskultu Mari, hieraŭ vi rompis florzavon kaj du tasojn, hodiaŭ vi rompis tri glasojn... kio okazos ĉi tie morgaŭ?

La servistino saĝe respondas: -Ne timu, sinjorino, trankviliĝu, ĉar morgaŭ mi havas liberan tagon!

Justa rajto

Knabeto petas kalendaron por la nova jaro en butikoj proksima al lia hejmo. La mastro proteste diras al la infano: -Sed, knabeto, viaj gepatroj ne kutimas ĉe ni aĉeti!

La knabeto saĝe rezonas: -Ni ne, sed la najbaroj jes, kaj mia panjo ĉiam prunteprenas ĉion de ili!

Saĝa principo

Ĵusa edziĝinto petas al sia direktoro plialtigon de salajro: -Mi kuraĝas peti al vi plialtigon de salajro, ĉar mi edziĝis!

La direktoro per teknikaj terminoj respondas: -Mi bedaŭras, sinjoro, sed mia firma ne kutimas pagi damaĝmonon pro akcidentoj okazintaj ekster la negoco.

Oni devas distingi

Pasie viro diras al sia fianĉino: -Ĉu vi rifuzas min, amata Maria? Ĉu vi ne volas iĝi mia edzino?

-Ho, mia kara, tiuj estas du aferoj malsamaj: antaŭe vi demandis min, ĉu mi volas ami vin eterne, kaj poste, vi proponas edziĝon. Kompreneble, ke mi akceptas vian duan proponon!

Malbelulino

La patro de malbela junulino riproĉas la fianĉon: -Kiel vi kuraĝis kisi mian filinon en la mallumo?

La fianĉo, konstatante la realan malbelon de la junulino, respondas: -Ho, sinjoro, senkulpigu min! Ankaŭ mi mem nun ĉe la lumo mi miras pri tio!

Malantaŭ la kulisoj

La ripetado ne sukcesas. Fine la direktoro krias: -Ĉu ni estas en teatro aŭ en frenezulejo?

La unua ĉefaktoro malbonintence respondas: -En teatro! Sed en la frenezulejo almenaŭ la direktoro estas normala homo.

Konscienca ŝtelisto

La juĝisto severe riproĉas ŝteliston: -Unue vi ŝtelis la tekono de tiu sinjoro kaj poste vi eĉ intencis mortigi lin!

La ŝtelisto pretendas pravigi sian fiagon: -Jes, sinjoro juĝisto, tion mi devis fari, ĉar en la teko aperis noto kun la jena teksto: «Malfermota nur post mia morto!»

Prezo de aŭtomobilo

Du ŝtelistoj konversacias: -Belegan aŭtomobilon vi havas. Kiom ĝi kostis?

-Nur du jarojn en karceron. Pensu ke ĝi apartenis al juĝisto!

Senlima vanteco

Du amikinoj konversacias pri intimaĵoj kaj unu diras la alian: -Al mia

edzo ĉio plaĉas ĉe mi: miaj haroj, miaj vestoj, mia voĉo, mia figuro, miaj kapricoj...

-Kaj al vi, kio plaĉas ĉe via edzo? -respondas la alia.

-Lia bona gusto! -replikas la unua senhezite kun granda fiero.

Taŭga preteksto

-Kelnero, jam antaŭ pli ol duonhoro mi mendis la testudan supon, kial oni ne portas ĝin?

-Ho, sinjoro, mi multe bedaŭras tion, sed jam vi scias kiel ege malrapida besto estas la testudo!

Konsulto al spiritisto

Naiva spiritismkredanto demandas al spiritisto: -Ĉu estas vere, ke la spirito de Beethoven aperis antaŭ vi? kaj kion li diris?

La spiritisto senhezite respondis: -Jes, li aperis kaj diris al mia edzino ke ŝi ne plu ludu liajn sonatojn, jen kial ŝi nun turmentas min aĉe pianludante nokturnojn de Chopin.

Pedagogio

Pedagogo emfaze parolas al malfeliĉa patro pri kvar sovaĝaj gefiloj: -Neniam oni devas bati la infanojn-, kaj aldonas: -Mi supozas, ke vi neniam tion faras, ĉu ne?

La malfeliĉa patro prudente respondas: -Ho, ne! Tre malofte, sed ĉiam por memdefendo!

De eraro al eraro

La juĝisto severe: -Vi eniris hieraŭ nokte je la dua horo tra fenestro rompinte vitron, kion vi serĉis tie?

Ruze la akuzato respondas: -Mi opiniis, ke ĝi estas mia loĝejo.

La juĝisto kun triumfa tono: -Kaj kial vi elsaltis kaj forkuris, kiam la mastrino malkovris vin?

La akuzato senhezite: -Ĉar mi pensis, ke ŝi estas mia edzino!

Alia pri juĝistoj

La juĝisto kun serioza mieno: -Kaj vi diras, ke tiu ĉi viro prirabis vin! Ĉu vi rekonas inter tiuj multaj aĵoj vian propran?

La denunciinta virino: -Jes, tiu poŝtuko kun la litero M.

La juĝisto replikas: -Sed, sinjorino, tio ne estas pruvo, ĉar ankaŭ mi mem havas poŝtukon kun litero M.

La virino obstine: -Ĝuste! Precize du mankas al mi!

Antaŭ bela pejzaĝo

Edzo al sia babilema edzino: -Kia vi trovas ĉi tiun pejzaĝon, mia kara?

-Ho, karulo, superba, mi restas muta!

-Bonege!, -sopiras la edzo, -tiam ni restos ĉi tie dum tri monatoj!

A. Lapra

.....

FRANCISCO VILLAESPESA

Teatroverkisto kaj poeto naskiĝinta en 1.877 en Laujar de Andarax (Almerio) vilaĝo sur deklivo de Sierra Nevada, ne tro malproksima de la bela Granado. Apenaŭ 20-jara li translokiĝis al Madrido, kie post unu jaro li publikigis sian unuan verkon "Intimeco".

Bona amiko de Juan Ramón Jiménez en la hispana ĉefurbo, li senkondiĉe admiris Rubén Darío, kies estetikajn ideojn li disvastigis en Hispanio kaj Ameriko. En 1911 li komencis sian sukcesan taskon kiel teatroverkisto per "La alcazaro de la perloj", verkante prefere per versoj kaj pri historiaj temoj, aktivado kiun li alternigis kun la verkado de poezio. En 1917 li vojaĝis al Ameriko, kie li vigle aktivis ĉe Sud-Amerikaj verkistoj kaj poetoj.

Lia stilo modernisma ankoraŭ havis romantikismajn trajtojn, ĉar en ĝi aperis la influo klara de la sonoraj esprimoj kaj inklino de Zorrilla por la orientalismaj kaj prihispanaj temoj. Famigis lin rapide liaj poeziaj verkoj: "La Muzo malsana" (1901), "Tristitia rerum" (1906), "La ĝardeno de la ĥimeroj" (1909), "La krepuskostagnoj" (1911), "Revo-ahimezoj" (*) (1914), "Sub la ombro de la cipresoj" (1917), "Blua groto" (1918), "Mirinda kaj ĉarma tero" (1921), kaj multaj aliaj, kiuj logis pro la brilo de la muzika esprimo de iliaj romantikemaj enhavoj, kvalito konstatebla ankaŭ en liaj poemoj. Jen unu el ili:

Leviĝas preĝo el izol-ĝardeno...
Forflugas paŝoeĥoj ĉe la padoj,
kaj l' arbo-ombroj laŭ fantom-ondadoj
sur kristal-lagon falas kun ekstremo.

Ĉe l' parko-fon' en romantika spleno
kaj ŝancelanta skalo da korbatoj,
fontan' fieras pri perlar-kromatoj
sub pala roza lum' en milda sveno.

L' animo de Chopin solec-inklina
esprimas triston per lirika ploro,
malsana pro tro da kares' virina.

Dormiĝas lasta pian-not' sen gloro.
Ĉe l' parkofrondo mortas kant' proksima,
ja najtingal' tremkantas kun langvoro.


Villaespesa spegulis per sia konduto tute fremda al societaj konvencioj la bildon de certa mita modernisna bohemia vivmaniero, kaj dum jaroj abunde verkadis ne nur originale, sed ankaŭ malvolvis gravan tradukan taskon.

Jen peco de unu el liaj plej karakterizaj verkoj pri orientstila temo, ĉi-foje tradukita de Grau Casas, situante la scenon ĉe la Alhambra palaco de Granada:

La fontoj de Granada

Alhamar: Mia poet', kion portas?

Abū-l-Beka: Sinjor', floron kaj kasidon,
La flor' el viaj ĝardenoj
kie ĝi tremis feliĉa,
kun la granda fierec'
povi ravi vian vidon.
Kaj se vi donas permeson,
kiun ŝi petas humila,
Sobeya, ja la plej bela



el Granadaj sinjorinoj
antaŭ via bril-kortego
recitos mian kasidon...
Kasidon al la fontanoj
de via urb' favorata.

Alhamar: Mi danke la floron prenas
sed ni aŭdu la kasidon.

Sobeya: La fontoj de Granado...
Ho, admiro!
En la nokto, kun steloparfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro?
Ĉio ripozas kun plej rava sento
en l'argento fluida de la luno.
Ĉe l'odoro je nardoj sentebla tra la vento
akvo-freŝeco estas kiel unu
mano refreŝiganta tempiojn por momento.
La akvo estas kvazaŭ urbo-anim'. Ĝi viglas
dum ĝia dorm', kaj flustre
rakontas de l'silento
la legendojn vivantajn malgraŭ forges-doloro,

kaj sub la brilaj steloj de la nokto trankvila
ĝi havas ja pulsadojn de disŝirita koro.
La akvo-voĉo sanktas!
Kiu trafas l'akcenton, fundan muzikon ĝian,
iam povos kompreni ankaŭ parolon dian...
Di' per la akvo-guzlo siajn misterojn kantas!

La fontoj de Granado...
Ho, admiro!

En la nokto, kun stelo-parfumado,
ĉu io pli doloras ol ilia ĝem-spiro? ktp.

Francisco Villaespesa krom traduki multnombrajn verkojn kaj abunde originale teatroverki, ankaŭ publikigis multajn interesajn rakontojn, el ili ni citu: "Mildaj mirakloj", "La Penelopa ŝtofo", "La floranta rubusujo", k.a. Bedaŭrinde li ne montriĝis tro rigora pri siaj verkoj, sendube tre abundaj, kaj tial li verkis kune kun belegaj poemoj aliajn ne tiel bonajn, pri kies kvalito oni povus postuli pli altan nivelon.

Li mortis en Madrido en la jaro 1936.

A.M.B.

...

(*) Aĥimezo: (el la araba al-ŝimāsa, fenestro): Fenestro dividita je du partoj per centra koloneto sur kiu kuŝas du ĝemelaj arkoj. (Temas pri elemento tre ofta en la araba arkitekturo.

Al niaj membroj kaj abonantoj:

En alia loko de tiu ĉi numero ni aperigis la novajn kotizojn por HALE-membroj kaj abonantoj. Ni petas al ambaŭ fruan pagon de membrecoj kaj abononj por efike helpi nian administradon kaj samtempe rekomendas ilin adresi la monsendojn rekte al la Kasisto: José M^a Bernabeu Franco; Libreta de Caja Postal n-ro 28.09.722.429. Sen aldona sendokosto.

Ni jam antaŭdankas al tiuj, kiuj bonvole akceptas nian konsilon.

LA KOSTO MORTI EN USONA HOSPITALO

La pasintan oktobron iu nekonato pafis kontraŭ la 17-jara Khristian Karotsch en la stomakon. Oni rapi-de kunprenis lin al la hospitalo de Fairfax, kie li mortis sur operaci-tablo kvin horojn poste.

La tagon, kiam oni entombigis lin, Liliane Williamson, ricevis leteron el la hospitala administranto, kiu esprimis kondolencon pro la morto de ŝia «filino».

Alia letero alvenis kelkajn tagojn poste. Per ĝi oni petis ŝin aranĝi la redonon aŭ kostojn de 15 transfuzoj, kiujn la filo ricevis antaŭ ol li mortis.

Du tagojn poste ŝi ricevis fakturon de la hospitalo de Fairfax por la 4 1/2 horoj, kiujn ŝia filo pasigis tie antaŭ ol morti. La kosto sumis entute 5.107,67 \$, t.e., pli-malpli, 648.590 pojn.

Lilian diris: "Mi pensis, ke tio ne estas ebla. Mi rigardis la komencon de la fakturo kaj jes, tio estis la noto rilata al Krist, sed mia nomo estis erara, same kiel la dato de la eniro en la hospitalon. Ili fakturis al mi por du operaci-ĉambroj. Tamen li mortis en la unua. Oni fakturis al mi por la ĉambro de intensiva zorgo, kiun li neniam okupis. Ankaŭ por 22 «sango-bankaj produktoj» kostantaj de 12 ĝis 126 \$. Troviĝis ankaŭ 15 debetoj pro kompleto da sango po 25 \$ por unuo. Entute aperis 27 «servoj plenumitaj» la 24an de oktobro, du tagojn post kiam Krist mortis!"

La fakturo havis sep paĝojn. "Mi re kaj re tralegis ĝin", diris Liliane. "Mi daŭre vidis la daton de servoj du tagojn post lia morto, kaj mi vidis kaj revidis la sangon, tiom da sango, kaj mi kriis: Mia Dio, ĉi tio ne povas esti vero!"

Fakte, reprezentanto de la hospitalo diris, ke la fakturo ne estas nekutime alta. "Fojfoje", ŝi diris, "ĝi estas multe pli alta".

Kiam s-ino Williamson telefonis kaj enketis pri la fakturo, la hospitalo simple ŝanĝis la datojn, nuligis debeton po 330 \$ por unu el la operaci-ĉambroj, kaj 12 \$ pro unu el la sango-bankaj produktoj.



Liliane dungis advokaton, kiu skribis al la hospitalo. La hospitalo respondis pardonpetante pro la fakto, ke oni nomis Krist filino (anstataŭ filo), klarigante la erarajn datojn, kaj malpliigante la sumon de la fakturo al 4.057,67 \$ (malaltigo de pli ol 1.000 \$).

Jen pluaj detaloj pri la pafado kaj morto de Krist: "Li promenis laŭ strato kun amiko, kiam aŭtomobilo alproksimiĝis kaj haltis apud ili. Junulo eliris kaj demandis Krist, ĉu li havas mariĥuanon. Krist diris, ke ne, kaj la ŝoforo de la aŭtomobilo eliris kun pafilo, pafis kontraŭ li en la ventron kaj foriris".

Kiam s-ino Williamson eksciis pri la morto de la filo, ŝi parolis al unu el la kirurgoj kaj demandis, kiel kaj kial li mortis. "La kirurgo demandis min, ĉu mi iam estis vidinta la internaĵojn de kokido", ŝi rakontis. Mi diris: mi ne komprenas. Kaj li daŭrigis: bone, ni ne estas tro malsamaj ol ili". Kiam ŝi demandis la doktoron, kio okazis por tio, ke oni aplikis tiom da sango al la filo. Li respondis, ke ĝi eliĝis "tute sur lian pantalonon. (Per tiu frazo la kirurgo sendube komprenigis, ke la injektita sango tuj elfluis tra la vundo, sed ĝi montras tipan respondon de iuj kuracistoj ĉi tie, kiuj kredas sin duondioj)".

Kuracisto Peter D.LeNard agnoskis, ke li komparis la mortintan filon al kokido. Li diras, ke li faris tion "ĉar la plej multaj homoj bone konas la internon de kokido; se vi iam kuiris, vi konas la internon de kokido, kaj tiel iĝas pli facile ekspliki la koncernajn anatomiajn principojn". Kiam oni demandis lin, ĉu estas vero, ke li diris tion pri la sango kaj la pantalone, li respondis: "Mi ne havas eĉ la plej nebulan ideon".

La tradukinto de tiu ĉi kroniko, esperantisto Sergio Docal, asertas, ke tiu konkreta kazo okazis antaŭ kelkaj jaroj (kroniko **Washington Post**, dec. 23/77) kaj aldonas, ke kazoj kiel tiu rakontita ripetiĝas ankaŭ hodiaŭ. La sola diferenco inter tiu kaj la nunaj kazoj en 1996 estas, ke la nunaj kostoj estus kvaroblaj aŭ kvinoblaj...

La kosto morti en usona hospitalo estas ja terure alta!

Trad. Sergio R. Docal



La Zamenhofa Tago

En multnombraj esperantistaj rondoj el la tuta Hispanio oni celebris per diversaj festoj la naskiĝdatrevenon de D-ro Zamenhof, en kiu speciale oni emfazis la valorojn socian, kulturen kaj edukan de la LIBRO.



Zamenhof

K-do A. Marco Botella prezentis sian ĵus reeldonitan lirikan antologion hispana-araba-hebrean, **Lirikaj perloj de Al-Andalus**, en Zaragozo kaj Madrido. Pri ĝia prezento en Barcelono okupiĝis loka samideano.

En la du unuaj menciitaj urboj interesa kolokvo pri la ĉeftemo de la verko sekvis la prezenton de la libro.

Kun sama karaktero, omaĝo al D-ro Zamenhof kaj al la Esperanto-libro, oni celebris la festotagon en Francio: SAT-Amikaro organizis en Parizo la 17an de decembro 1995 la

Feston de la Esperanto-Libro en restoracio "Melodine", en kiu René Centassi, ĵurnalisto kaj eks-ĉefredaktoro de AFP, kaj Henriko Masson, ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro, kunaŭtoroj de franclingva biografio de D-ro Zamenhof, prezentis la libron **L' homme qui a défié Babel** (Le père de l' Esperanto). Ambaŭ kunaŭtoroj prezentis la verkon kaj respondis la demandojn de la ĉeestantaro. Finiĝis la libro-prezento per komuna tostado

kaj aperitivo. Poste, en sama loko, komuna tagmanĝo, kaj posttagmeze varieteo, lotumado, deklamoj, skeĉoj kaj kantoj...

Ni tuj aldonu, ke la apero en Francio de la verko supre menciita, **L' homme qui a défié Babel**, fakte biografio de D-ro Zamenhof, estis aŭtenta eldona sukceso kun propagandaj pozitivaj efikoj por Esperanto: kiel sekvo de la apero de la menciita verko, **Le Figaro** aperigis la 5an de oktobro 1995 preskaŭ du paĝojn pri Esperanto kaj la klopodoj por krei internacian lingvon. Ankaŭ aliaj ĵurnaloj kaj radiostacioj komentis favore la verkon kaj ĝenerale Esperanton.

.....

Recenzo de lernolibro:

«ESPERANTO. Curso del Idioma Internacional».

Tiu ĉi libro, vera omaĝo memore al la pedagogia metodo de samideano Pedro Nuez, uzas kaj saĝe kaj estetike materialon de la inspirinto, modernigas la enhavon kaj la prezentadon de lia malnova baza kurso kaj aldonas al ĝi belegajn desegnojn kaj utilan indekson.



La faritan renovigadon estus certe ŝatinta al samideano Pedro Nuez, ĉar la teksto konservas la esencon de la originalo kaj aldonas la necesajn elementojn por faciligi modernan memlernadon de Esperanto.

Gratulon al Miguel Gutiérrez Adúriz pro sia inteligenta kaj utila laboro.

Juan Carlos Ruiz Sierra

Laboristaj-esperantistaj revuoj

Dum tiuj unuaj tagoj post la venko en Barcelono de la laboristoj kontraŭ la militista ribelo (Jul. 1936) aperis en tiu ĉi urbo "Informa Bulteno de CNT-FAI", eldonita kaj redaktita de ILES-anoj, t.e. membroj de "Iberia Ligo de Esperantistoj Senŝtatanoj". Tiuj entuziasmpolenaj, aŭdacaj proletaj esperantistoj kunvenis iun tagon en sia sindikatejo kaj fondis ILES-on.

Antaŭe al la hispana intercivitana milito, ILES sukcesis registri certan aktivecon malgraŭ la malfavoraj politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj: oni starigis Grupon en preskaŭ ĉiu provinca ĉefurbo kaj grava urbo de Hispanio, kie ekzistis liberecana movado, kaj eĉ en kelkaj urbetoj ILES propagandis ĉion eblan, organizis kursojn kaj prelegojn, aperigis flugfoliojn kaj broŝurojn. Plej rimarkindan sukceson ILES atingis per aperigo de sia organo "NIA BULTENO". Ĝi estis vera informilo pri la vivo kaj aktivado de ILES, kaj bona komunŝtato kaj ligilo kun la liberecanaj esperantistoj el aliaj landoj. Tiurilate, ILES, subtenis konstantajn perkorespondajn rilatojn kun la Anarko-Esperanta Grupo de Stokholmo, kies energia aktivado koincidis kun la tononivelo dezirata por la iberia fako, kaj al ili oni petis konsilon pri la problemoj pli aktualaj de organiza kaj propaganda karaktero kaj kiel agi por pli facila penetriĝo en laboristajn rondojn. La plej granda celo de ILES, kaj ĝenerale de la anarkistoj, estis transformi tiun lukton kontraŭ la militistoj kaj hispana reakcio en socian revolucion. La vorto milito malaperis de la buŝo de anarkistoj anstataŭata de tiu pli adekvata *revolucio*, ĉar tiu kaj ne alia estis ilia celo.

La aperigo de Esperanta bulteno de ILES nur unu semajnon post la venko en Barcelono kontraŭ militistoj kaj faŝistoj, kaj la uzo de tiu propagandilo en la Ĝeneralitato de Katalunio (Registaro de Katalunio) por propagando, vekis ĉe la laborista klaso viglan intereson. Per iniciato de ILES ĉiuj esperantistaj grupoj kunvenis kun la celo fondi komitaton por la propagando de Esperanto kaj kontribui al la batalo kontraŭ la faŝismo. Fine ni diru pri ILES, ke ĝi kunagadis kun la proletesperantista PUIL, fondita en 1930, kiel ni jam menciis. La sola diferenco inter ili estis, ke dum PUIL estis anarkismema, ILES naskiĝis kaj vivis en la sino mem de CNT-FAI. La milito tute ne malintensigis la aktivadon de ILES (13).

(Peco el la prihistoria verko **Kronikoj pri Laborista Esperanto-Movado en Hispanio**)

Kajeroj ———
— el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str. Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.
50002 - Zaragoza (Hispanio)
